

ALVOKO DE LA 26-a DE APRILO

Por arta, intelekta, scienca kaj popola ekribelo kontraŭ pluigo de radioaktiva poluado de la planedo*

Enkonduko

La jena alvoko ne fontas el iu partio, sindikato, premgrupo, kolektivo, ktp. Gxi estas tiu de franca teatra trupo (Brutbetona Produktejo) kiu dedikas 50% el siaj artaj agadoj, jam de 16 jaroj, al la ligoj inter artoj kaj radioaktiva poluado.



Ke estonte la planedon poluos radioaktiveco ne estas eblo, sed realajxo kies pluadon ni povas nur decidi cxesigi . Krom se ni tiel plu iros, kaj nin preparos al novaj akcidentoj statistike anoncataj.

Du atomenergiaj katastrofoj sxokegis la homojn, kaj poste integrigxis en la okazajx-fluon: de post la 26-a de aprilo 1986, tiu de Cxernobil, kaj de post la 11-a de marto 2011, tiu de Fukusxima.

Tiuj katastrofoj, samkiel tiuj minacantaj, en tio apartas, ke ili ekas je la tago de la akcidento, kaj cxesas nur post centoj, aŭ ecx miloj da jaroj laŭ la "viv"-daŭro (oni diras: "duonvivo") de la radionukl(e)*idoj "liberigitaj" en la atmosferon, la maron kaj la grundojn.

Ni hipotezas ke plejmulte la informitaj logxantoj dezirus eliri el tiu poluata estonto, sed ne scias kiamaniere. Efektive, neniu gxis nun kapablis cxesigi tiun progresivan kuradon al radioaktiva poluado de nia tuta planedo.

Ju pli pasas la tempo, des pli sentblas la impreso ke ni glitadas en la "atomenergian vintron".

Neniu demokrata nek burokrata instanco, neniu tribunalo, neniu universitato, jam de 70 jaroj kapablis cxesigi la prometean frenezon de la nukleokratoj*. Neniu povus ilin sxanceli. Nek la plej gravaj akcidentoj, nek la minaco de atombomba milito, nek la kolosegaj monperdoj, nek la senfinaj vorkoj, nek la rubajx-akumulado, nek la sciencaj pristudoj kontraŭdirantaj iliajn aplombajn asertojn.

DO, KION FARI ?

La alvoko

Urgxas ke la nuntempe klarvidaj individuoj, konsciaj ke tujas novas civila aù/kaj milita atomenergia katastrofo, havu kuragxon kaj eklevigxu ! La jaro 2016 devus esti la jaro de popola ekkonsciigxo.

La 11-a de marto 2016 estos la tago memoriga (5 jarojn poste) de la katastrofo de Fukusxima, kaj la 26-a de aprilo (30 jarojn poste), tiu de la ekkatastrofo de Cxernobil. Cxie en la mondo tiuj datoj estos celebrataj.



Ne akcepteblas, ke la atomenergia lobio* decidus kion oni pensu, diskonigu, diru kaj skribu.

Jam de hodiaù ni: artistoj, jxurnalistoj, instruistoj, fotistoj, muzikistoj, aktoroj, bibliotekistoj, strat-artistoj, sciencistoj, dancistoj, dokumentistoj, cirk-artistoj, poetoj, responsuloj de spektaklejoj kaj kinejoj, festival-direktoroj, balot-elektitoj, koncernataj aktivantoj kaj civitanoj, ni eklaboras por stimuli konsciencan ekribelon kontraù poluata estonto kaj produkti, realigi aù akcepti legadojn, kolokvojn, spektaklojn, prelegojn, ekspoziciojn, projekciojn, balojn,

karnavalojn...**Inter la 11-a de marto kaj la 26-a de aprilo 2016**, dum sep semajnoj, oni surscenigu tekstojn, legu aliajn en pluraj lokoj samtempe, oni projekciu filmojn, ekspoziciu fotojn, enprogramigu debatojn kaj kolokvojn en la fakultataj amfiteatroj, sur la publikaj placoj, en la alternativaj lokoj, la urbaj teatroj, la teatrocentroj kaj sur la naciaj scenejoj, en la lernejoj kaj bibliotekoj, urbodomoj, forlasitaj fabrik-spacoj.

Necesas ke ekribelo de la artistoj, intelektuloj kaj sciencistoj konvinku la civitanojn meti finan punkton al nia estonto de radioaktiveco. Kaj ke mil spektakloj, libroj, pentrajxoj, baledoj, koncertoj, gazet-raportoj, baloj, kolokvoj, karnavaloj, poemoj, ekspozicioj kaj esploroj ekfloru !

PS. La jena alvoko estas jam hodiaù lanxata por ke cxiu povu pripensi, legi, komuniki, trovi subtenojn, financajn helpojn, forumojn, lokojn por prezentoj kaj ekspozicioj.

Brutbetona Produktejo sin proponas por kunordigi tiun alvokon.

Vi povas nin kontakti cxe brut-de-beton@orange.fr c/o Bruno Boussagol

Telefono: 0033 (0)4 63 31 50 12 **c/o André Larivière**

Retejo: www.brut-de-beton.net

Mi subskribas la jenan alvokon:

Familia nomo:

persona nomo:

Organizo, grupo aù asocio (se necese)

Ret-adreso

Telefon-numero

Mi proponas mian partoprenon per la jena projekto:

- Dato kaj horo (inter 11 marto kaj 26 aprilo 2016):
- Preciza loko (lando, urbo, placo aù spektaklejo*)

-Kontaktebla persono por tiu evento , kun kontaktiloj (ret-adreso & tel.):

*aù : kontaminado, radionuklidoj, atomenergi-potenculoj, premgrupo, cxambro